

Centro por monda paco per juro
Claude Gacond, 132-a radioprelego, 1966.04.13 & 1966.04.16

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ ni festos la naskiĝon de bubo, kiu riskas baldaŭ ludi gravan rolon en la monda vivo.

A.- Kiu estas tiu bubo, kies karieron vi profetas?

Cl.- Ĝi estas nova mond-organizaĵo, kies internacia sekretario ĵus instaliĝis en Ĝenevon. Temas pri la Monda Juĝistara Asocio, kies sekretario nomiĝas: Centro por Monda Paco per Juro. Tiu centro volas helpi la juristojn, kiuj laboras al kreo de tutmondaj juraj kutimoj supernaciaj.

A.- Rakontu iom pri tiu fondiĝo!

Cl.- La 12 kaj 13-ajn de marto okazis en Ĝenevo konferenco, dum kiu la prezidanto de tiu nova asocio prononcis tre valoran prelegon. Tiu juĝisto estas sinjoro Earl Warren, la prezidanto de la Supera Kortumo de Usono. Bedaŭrinde raras la raportoj pri tiu prelego.

A.- Verŝajne la ĵurnalistoj pensas, ke iliaj legantoj ne interesiĝas pri la menciitaj problemoj. Kion rakontis tiu gravulo?

Cl.- Tiu juĝisto rimarkigis, ke dum hodiaŭ en ĉiu civilizita nacio la interhomaj konfliktoj estas kvietigataj de la tribunaloj, kies juĝoj sin bazas sur firma jura sistemo ĉiam plibonigebla, siaflanke la internaciaj konfliktoj ne estas submetataj al tribunalaj juĝoj. La disputoj solviĝas plej ĝenerale nur per perfortaj rimedoj, tio laŭ la ĝangala leĝo, kiu volas, ke la plej forta ĉiam pravas.

A.- Kaj ĉiuj scias, ke ne necese pravas la plej forta nacio.

Cl.- Jes. Kaj pro tio la konfliktoj neniam solviĝas. Kontraŭe ili ĉiam pli akriĝas kaj senĉese naskas novajn konfliktojn. Hodiaŭ la internacia vivo estas venenigata de tiuj nesolvitaj konfliktoj. La juĝisto Warren asertis, ke ni devas antaŭeniri en la direkton, kie la juro plenumas la samajn funkciojn por la internaciaj rilatoj, kiel nun ene de la ŝtatoj. Ni devas starigi juran sistemon, kiu preventos la militojn, sin bazante sur la justeco, la libereco kaj la vero kaj forigante perforton.

A.- Ŝajnas aŭdi asertojn el la verko *Interpopola konduto* de Edmond Privat, verko famiĝinta en la esperanta mondo.

Cl.- Ĝuste. Pro tio ni devas festi la naskiĝon de tiu nova mond-organizaĵo. Nova utopio ekvivas. Fakte jam de multaj jardekoj juristoj laboras al tiu celo. La Paca Kortumo en Hago, Nederlando, Ligo de Nacioj kaj la hodiaŭa Unuiĝinta Naciaro estas unuaj provoj efektiviĝi regadon de la juro super la naciaj suverenecoj. Sed la granda plimulto de la juristoj ne volis ebligi tiun ĉi revolucion. Por ili la propra nacio estis absolute tabua. Tamen la okuloj fine malfermiĝas. Oni konstatas, ke tiu kulto al la naciaj suverenecoj nur kondukas la homaron en senelirejon. Juĝisto Warren konstatas la fakton. Li diris: « *Nia epoko estas nomata spac-erao, scienc-erao kaj atom-erao. Tamen, se la homa specio deziras pluekzisti, nia epoko ankaŭ devos esti la pac-erao. Por tio la disvolviĝo de la juro devas esti lokita je la centro de la internacia streĉo celanta starigi monden stabilecon, ordon kaj pacon.* »

A.- Estas agrable aŭdi tiajn vortojn el la buŝo de la prezidanto de la Supera Kortumo de Usono.

Cl.- Estas pruvo, ke en ĉiu nacio ekzistas du tendencoj. Se hodiaŭ pro la vjetnama konflikto ni tendencas identigi Usonon al militema popolo, ni ne forgesu, ke kontraŭe el tiu lando, kiu

fakte estas federacio de ŝtatoj, alvenis alvokoj al konkordo, ke prezidanto Wilson estis la estiganto de Ligo de Nacioj, kaj ke la nuna Unuiĝinta Naciaro naskiĝis ne nur hazarde en San-Francisko. Dum la dua mondmilito juristoj de tiu lando faris tre interesajn studojn, kaj se en 1945 la registaroj estus ilin aŭskultintaj, ni estus tuj farintaj gravan paŝon antaŭen al la regado de la juro super la perforta militemo.

A.- Verŝajne, malgraŭ la milit-ruinoj, la homaro ne estis preta al tiu revolucio.

Cl.- Tio ĉefe pro la ekzisto de la koloniaj teritorioj. La eŭropaj metropoloj ne povis akcepti kontrolon super sia regado. Ili ne antaŭvidis la tre baldaŭan emancipiĝon de tiuj teritorioj. Verŝajne hodiaŭ la vivnivela diferenco inter la ekonomie fortaj kaj feblaj landoj estas ankoraŭ unu baro al tiu revolucio. Sed la agado de la ĵus fondita Monda Juĝistara Asocio riskas rapidigi la eventojn kondukantaj al akcepto de supernacia monda juro.

A.- Ĉu tiu asocio de juristoj estas vere sufiĉe grava por havi tiun influon ?

Cl.- Ĝia projekto estis proponita dum la Konferenco por Monda Paco per Juro en Ateno en 1963. Pasintan jaron pli ol trimil juĝistoj kaj juristoj renkontiĝis en Vaŝingtono por diskuti tiun proponon. Ili apartenis al la superaj kortumoj de pli ol cent landoj. Jen fakte io nova.

A.- Tio reprezentas la plimulton de la ŝtatoj.

Cl.- La grandan plimulton. Do proponoj de tiu asocio riskas esti serioze pritraktotaj. Por reveni al la diroj de prezidanto Warren, jen alia citaĵo : « *La membroj de la jura ordeno en la tuta mondo ne plu volas esti simplaj spektantoj de la mondaj eventoj. Ili sentas sin forte ligitaj al la homara destino. Ili estas nun starigantaj programon, kies fundamento estas la juro kaj kiu devos sin substitui al la uzo de la forto de la armiloj.* » Juĝisto Warren aldonis : « *La tempo, kiam la registaroj de la popoloj povis akiri famiĝon helpe de armiloj estas nun eksa. La granduloj de nia epoko estos tiuj, kiuj ekkonstruos homaron pace strukturitan. La reĝimo de la juro anstataŭos efektive la forton, kiel faktoron por la kontrolo de la homara destino, tuj kiam la popoloj konvinkiĝos, ke juro estas la sola valida rimedo kapabla starigi novan vere homecan mondon. Estos tiam la venko de tiu longa serĉado al paco far la homoj.* »

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-